Kultura vojaĝo al Nederlando – de la 21a ĝis la 25a de majo 2014

Definitiva programo

Merkredon la 21an de majo 2014

- vojaĝo de Pollando al Nederlando
- alveno en Ibis Zaandam (norde de Amsterdamo) por la du unuaj noktoj - nova hotelo kun 3 personaj ĉambroj (1 dupersona lito kaj unu alta unupersona lito) kaj privata duŝo/necesejo – matenmanĝo ne inkludita.

Jaŭdon la 22an de majo 2014: Amsterdamo

- post la matenmanĝo, vojaĝo perbusa al Amsterdamo (20 km)
- ni komencas je la 10.30a horo kun la tuta grupo per la **perboata vizito de Amsterdamo** – 100 highlights tour (**cent vidindaĵa rondiro**) - € 9,- pp – klarigo en la pola
- tagmanĝo proprakosta
- posttagmeze ni vizitos la Van Gogh muzeo - € 15,- pp http://www.vangoghmuseum.nl/ (ĉiĉeronas Katalin Kováts)
- + Anne Frank muzeo - € 9,- pp http://www.annefrank.org/ (ĉiĉeronas Sylvain Lelarge)

- la grupo manĝas proprakoste promenante tra la centro de Amsterdamo (diversaj vidindaĵoj)
- reiro perbusa al Ibis Zaandam.

Vendredon la 23an de majo 2014: Hago

- post la matenmanĝo, vojaĝo perbusa al Hago (60 km)
- 10.30a: vizito de la **Panorama Meesdag** (http://panorama-mesdag.com), mirinda cirkla pentraĵo de la fino de la 19a jarcento, kiu donas impreson de vojaĝo en la pasinteco ĉiĉeronas Katalin Kováts) - € 8,50 pp
- 12.30a > 14.00a: manĝo en restoracio en centro de Hago - € 12,-- pp
- vizito de la **historia centro de Hago** (ĉiĉeronas Sylvain Lelarge) - senpage
- promenado en la **Westbroekpark**, mirinda florparko kun mondfama rozejo - senpage
- **vespermanĝo ĉe la maro** (fritoj kaj fiŝo fritita aŭ la fama nederlanda haringo – pli-malpli € 8 pp) kaj promenado laŭ la marbordo (tutnova bulvardo kun tre interesaj statuoj) ĝis la 19a horo
- forvojaĝo al StayOckay in Sneek (180 km – inter 2 kaj 2,5 hora vojaĝo kun interesa digo)
- StayOckay: plurpersonaj ĉambroj kun privata banĉambro. Matenmanĝo inkludita.

Sabaton la 24an de majo 2014:
Frisaj vilaĝoj kaj Leeuwarden -

- post la matenmanĝo, ekskurso al Hindeloopen, unu el la 11 famaj urbetoj de Frislando, fakte subĉiela muzeo kun ĉiĉeronado de lokaj esperantistoj (Nanne kaj Ankie)
- tagmanĝo enbusa aŭ surloka
- posttagmeza vizito de la **stratfestivalo en Leeuwarden** kun eblo viziti la **Museumhaven** **(**muzean havenon)

- 18.30a horo: **vespermanĝo ĉe Stayockay** Sneek - € 11,-- pp
- 20a horo: **tradicia dancgrupo** en Stayockay - http://www.ljouwerter-skotsploech.nl/

Dimanĉon la 25an de majo 2014: Sneek

- post la matenmanĝo, seminaria programo en la hotelo
  - 10.00-10.45: kantoj kaj **prezento de Kajto**
  - 11.00-11.45: **Kapriol' prezento** pri historio kaj lingvo de Frislando
  - 12.00: **koncerto de Kapriol'** + Frisaj dancoj, frisaj vestaĵoj
  - 13.00: **tagmanĝo 'folklora'** kun Berenburg gustumado (loka alkoholaĵo)
- vizitado de Sneek piede + **Scheepsvaartmuzeum** (http://www.friesscheepvaartmuseum.nl/ ŝipmuzeo – tre interesa pri la pasinta vivo en Frislando - € 5,-- pp
- Hejmenveturado.